GISTO, MAR-08.
Redaktas: ottovaske@ibest.com.br
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo

0303030303030303030303030303030303030303030303030303030303030303030303030303

QSO *

Dum februaraj ILERA-kunsidoj, la plej vasta asembleo de esperantistoj en la mondo, okazis kun multaj geamikoj side sur siaj preferataj foteloj, chiu en sia hejmo. Cheestis la rondanoj Enivaldo (gvidanto, el Brasilja), Maùrisjo (Fortaleza), Hektor (Chilio) la gaúcho el Lajeado Lenjo (en Londono), Jojo (Tokio) Hans kaj Wolf (Germanio) Thormod (Norvegio), Svetlana (Siberio) kaj Vaske (Brazilo). Ofte envenas pliaj samideanoj en la EchoLink-trafejon, esperantistoj aù ne. Chi-lastaj kutime estas scivolemuloj kiuj pridemandas, en nacia lingvo, kiun lingvon parolas ni dum la rondo.

* Kvo,so,o=QSO, internacia Kvo-kodo, signifas telekomunikadon inter du aù pliaj stacioj

LENIO

Chiam kaùzas plezuron aùskulti la modelan prononcon de Lenio en la vico kiam li alparolas la rondanojn, chiam lante, laùte kaj per forta signalo de lia stacio. La VK-rondanoj, kiuj ne estas radioamatoroj, devus iam interkonsenti sufiche antaùtempe, por viziti min en sabato aù dimancho cele aldoni siajn vochojn al la jam tradiciaj semajnfinaj paroladoj. Sed, post interkonsenti pri la vizito k. avertu min por ke mi petu al Lenio nepre cheesti la babiladon en tiu tago. Gxi okazas chiam je la 20,30 UTC, tio estas, nuntempe je la 17,30h brazila tempo. Do, pli komforte estus por vi petveturi kun samideano “richulo” kiu posedas aùton. La evento oportunus antaù majo, kiam Lenio denove vizitos sian panjon kaj parencaron. Kaj, espereble la fusxulo manovros por chi-foje trafi la monatfinon en la gaúcha chefurbo. Chiuj volas konatigxi kaj paroli kun la ILERA-sekretaria mosxto, kvazaù profesia turisto...hi..hi.

TRIOPE

Kiu silentas, tiu konsentas, validas popola dirajxo. Neniu leganto manifestigxis ril. la de mi promesitan tekston.Do, jen gxi, por iomete farchi la rutinon.

Virinoj ne voluptemaj, kiuj spektis la TV-scenon en programero far Ratinjo, certe abomenis la spektaklon. Virojn gxenerale tiklis la nekutima prezentado, krom tiujn tre prudaj. Ratinjo anoncis: vi eble ofte sciigxis pri edzeca vivo de viro kun du aù tre edzinoj, indigxenoj aù ne. Hodiaù mi montros al vi pacan kunvivadon inter juna geedza paro plus la bopatrino, vidvino chirkaù 40-jaragxa, panjo de la edzino. - Dum vintraj tagoj de centra brazila altajxo, la tri homoj kutimis pasigi la vesperojn spektante TV-programojn, kune en la geedza lito. Sxi, li kaj la vidvino lia bopatrino, en chi sama ordo.Chiuvespere ili pasigis kusxe agrablajn horojn, rakontis la TV-prezentanto. Se la programo montris “varmegajn” scenojn, tio vekis apetiton en la tri homoj. Laùlonge de la monatoj la trio akiris pli da intimeco inter si. La edzo kuragxis varme kisi la bonaspektan

bopatrinon, sen estigi protestojn de la edzino. Sub la litkovrilo okazis sxtelaj kontaktoj kiuj sentigis al li sxian karencon. Tio kuragxigis la junan viron avanci iomete pli. Li komentis kun sia edzino sian bedaùron pro karenco de la vidvino jam de pluraj jaroj manke seksumado kaj petis sxian konsenton, pretekstante ke ne okazos gravedigxa risko ke, pro sxia cheesto, ne okazos perfido. Post malklara jeso li tuj kaptis la "oldulinon" streche en siajn brakojn dum entuziasmoplena kisado. – Sekve la ekrano montris, per litkovrilo kasxitan scenon, kiu pensigis pri seksuma amrilato inter bopatrino kaj la bofilo. Pli poste oni spektis deklaron sxian: "li posedas aprecatan virecan dokumenton, kiun chiu ajn virino avide disputus". – Chi tie oportunas bildigi al si, kiaj subkovrilaj interrilatoj silente kaj kasxeme... kiom da reciprokaj ekscitigaj palpadoj okazis dum multaj vesperoj, antaù ol ili havigis al si konsenton de la edzino por, de nun, okazigi malkasxajn amorajxojn. Aldonaj scenoj montris ke li sxajne preferis la bopatrinon sed lia juna edzino ne jxaluzis. Jen paca familio. Tiaj interrilatoj, vaste montritaj per la TV, infektas la menson de la junularo, igas ilin "bredi lumbrikojn en la pensejo", laù popola dirajxo. "Gxuste kiel plachas al la Diablo", oni kutimas averti la nunan generacion, por ke la tuta homaro ne farigxu chiesul(in)oj. Savigxu la familio!.

NEOLOGISMO

Lastan Gisto legis nia kara Lenio, sendita al li pere de la reto. Sekvintan QSO per e-mesagxo li primekis mian vorton PORNOA. Laù la NPIV, kiun mi ankoraù ne posedas, oni diru/skribu PORNA. Aldone mi mencias, far Stefan Maùl, en la revuo MONATO: Gxorgx DABLJU Busx. Do mi rajtas konsideri min ne tro eksmoda rilate al la skribo de propraj nomoj, kiel cetere faras la chinoj en CRI kaj en ties jxurnalo MIKROFONE.

PROJEKTO

Prospero postulas investon. Oni revas arigi la gaùchajn plej diligentajn gesamideanojn okaze de kunsida tagmangxo, koste de la plej malavaraj homoj char pluraj, por ne diri multaj, el ni ne eltenas elspezon aldonan al sia monata bugxeto. La libertempa tago elektita povus esti la 21/04 aù 22/05/2008, en la lunchejo PANELA DE BARRO (laù interkonsento) Kiel proponanto, mi decidis kovri R$ 100 de la totala elspezo kaj esperas ke aliaj bonstataj geamikoj kune sursxultrigos la ceteran parton de la pagenda fakturo. Nun, jen la "kribrilo": chiu mangxonto devos atesti ke li/sxi scias parkere reciti (deklami) kelkajn strofojn de poezio aù flue kaj sen eraroj laùtlegi, en la mangxejo, unu pagxon da simpla teksto de si mem elektitan. Vi chefurbanoj BV kune publikigi inviton en ZH aù CP (prefere en ambaù.), por vaste montri ke ni ekzistas kaj ke, neesperantistoj kiuj interesigxos aùdi la neùtralan, tiuj klopodos tagmangxi en la sama ejo, horo kaj tago. Ni tuj diskutu la proponon, cheeste kaj/aù perposxte.

RUZECO - far Luiz Karlos komandanto.

De Eùropo al Brazilo flugis kune pastro kaj eleganta sinjorino. Post du horoj la du amike babilis. Ne plu for de RIO la sinjorino komentis, ke sxi akiris modernan hararsekigilon, ke sxi iom timas devi pagi importan imposton. Samtempe sxi riskis peti helpon de la pastro. Sxi proponis ke li portu la aparaton sub siaj klerikaj vestajxoj. Li konsentis. Kiam en la doganejo venis la Vico de la ekleziulo esti pridemandata ril. objektpjn de li kondukataj, la pastro deklaris: de la zono supren, neniu valorajxo. - Kaj de la zono suben?- demandis la kontrolisto. Li respondis, mi kunportas mirindan ilon por enhejma uzado, chefe por virinoj sed gxi estas neniam uzita. La kontrolisto laùte ekridis kaj diris: vi povas pasi. Antaùen la sekva.